# *Avancas preparlaboroj de elektoj distriktaj en Venezuelo.*



Karakaso, 6 nov (RHK) La ministro por internaj rilatoj, justico kaj paco de Venezuelo, Néstor Reverol, informis ke jam kunordi?as la efektivigo de la Plano Respubliko por la elektoj de distriktaj konsilantaroj la venontan 9-an de decembro.

Per sia konto de Twitter, la ministro klarigis ke ?iuj funkciuloj estos je dispono de la strategia operacia stabo de la bolivaraj armitaj fortoj naciaj (Ceofanb) por kunordigi kaj aktivigi en la venontaj semajnoj la menciitan planon, la? raportis la televida ?eno Telesur.

La 9-an de decembro la venezuelanoj partoprenos alian elektan tagon por elekti 4 900 magistratanon el kiuj 1 703 postenoj estos je la nominala rango; aliaj 685 restas en listo kaj 69 en reprezento de indi?enaj komunumoj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/175814-avancas-preparlaboroj-de-elektoj-distriktaj-en-venezuelo

# Radio Habana Cuba